

Fajrero 2/1960

LIBERIGO VENIS ANTAŬ DEK KVIN JAROJ.

Ni festas la dekkvinan datrevenon de nia liberigo. La liberecon alportis la Ruĝa Armeo la 9-an de majo 1945. Sed mi volus rakonti pri la kvin tagoj, kiuj antaŭiris la tagon de liberigo. Jen estas mia historio. Ĝi estas nur ero de la historio de nia lando. Ĝi estas simila al historio de aliaj homoj.



Sabate la 5-an de majo 1945 meztage fariĝis bela vetero. La suno brilis kaj homoj post pli ol ses jaroj havis denove pli feliĉan vizaĝon.

Mi iris kun mia patrino surstrate. Germanaj titoloj super vendejoj estis preskaŭ ĉiuj for kaj ankaŭ la uniformojn de germanoj mi ne vidis. En vendejo apud Arbes-placo estis amaso da homoj. Tio estis vendataj ĉeĥoslovakaj flagoj. Antaŭ la vendejo estis longa vico de homoj. Ŝajnis, ke ĉio fluos kvieta. Ni ankaŭ volis aĉeti flagon, sed subite – pafoj kaj konfuzo – mi kuregis hejmen! Komenciĝis revolucio de praga popolo kontraŭ la faŝistaj okupantoj. Unuaj pafoj! Unuaj elsendoj de liberigita Radio Praha petantaj tujan helpon! Kaj unuaj barikadoj en stratoj!

Mia patro, kiu laboris en fabriko, diris al ni, ke li devas foriri kaj kune kun aliaj laboristoj gardi la fabrikon.

"Ne timu, mi baldaŭ revenos, iru al la kelo, kaŝu vin – mi tuj revenos." Mia patro kisis nin kaj foriris. Ni ne iris al la kelo, sed sidis en kuirejo kaj aŭskultis la radion.

"Ni vokas al ĉiuj, helpu al Radio Praha ... ni petas helpon, helpu al la ĉefurbo Praha, germanaj faŝistoj ..."

Kaj poste la okazaĵoj pasis rapide. Dimanĉe ni helpis konstrui barikadon en nia strato. Precize dirite du barikadojn. Sed ni devis kaŝi nin, ĉar aviadiloj "ŝtukoj" komencis flugi super niaj kapoj. Ni finkonstruis la barikadojn vespere. En nia strato regis kvieto. Mia patro ankoraŭ ne revenis.

Tutan lundon ni estis kaŝitaj, ĉar "ŝtukoj" kaj forta pafado daŭris la tutan tagon.

Plej teruran momenton ni travivis, kiam ni eksciis, ke sur ŝoseo de Zbraslav venas germanaj tankoj ... Ĝi estis vere terurega momento, kiu influis nian pensadon dum multaj horoj. Se la tankoj venos, ili iros tra nia strato, ili venos al nia barikado...

Fine lunde venis por kelkaj minutoj mia patro. Li rakontis nenion, nur sidis, manĝis, trinkis kaj estis malfeliĉa. Kaj denove li foriris defendi barikadon.

Ni, mia patrino kaj mi, restis solaj. Ni aŭdis pluajn malfeliĉajn informojn. Ni aŭdis ĉiam pafadon (ne estis malproksima tiu pafado), sed neniam dum la tuta revolucio la batalo venis ĝis nia strato. Germanaj takonj ankaŭ ne venis. Estis grandega feliĉo por ni. Sed ne ĉiuj praganoj estis tiom feliĉaj.

Merkrede la 9-an de majo venis denove malbonaj informoj. Ni estis kaŝitaj preskaŭ tutan antaŭtagmezon en la kelo. Je la 10-a horo venis mia patro kaj diris: "Ne timu plu, ni estas liberaj ..." Li prenis mian manon kaj ni eliris la domon, nian straton.

Ĉie estis homoj, ĉie feliĉo, ĉie suno ... Kaj subite mi ekvidis tankon, mi ne volis iri antaŭen, sed mia patro diris al mi:

"Ne timu, ĝi estas rusa tanko...!"

Ni venis proksimen al ĝi. Mia patro prenis min kaj kun helpo de rusa soldato mi troviĝis sur la tanko. Kia feliĉo! La tanko ekmoviĝis. Mi staris ĉe rusa soldato kaj fiere rigardis mian patron kaj aliajn homojn, kiuj svingis manojn kaj salutis nin,.

La strato similis al granda rivero


Praha, 17.3.1960

- ZČ -

AKADEMIANO JAROSLAV HEYROVSKÝ – LA UNUA NOBEL-PREMIITO EN ĈEĤOSLOVAKIO

La sveda akademio de sciencoj alte aprezante la tutvivan laboron de profesoro Jaroslav Heyrovský decidiĝis transdoni al li la Nobel-premion por malkovro kaj plua evoluigo de la polarografia metodo.

Profesoro Heyrovský, nun 69 jaraĝa, sentis inklinon al la natursciencoj jam ekde sia junaĝo. En la jaro 1909 li komencis studi ĥemion, matematikon kaj fizikon en la filozofia fakultato en Praha. Favora sorto ebligis al li daŭrigon de la studado en Anglio, kie kaptis lian intereson altnivelaj prelegoj de la Nobel-premiita W.Ramsay pri fizika ĥemio. En Londono Jaroslav Heyrovský eklaboris ankaŭ super doktora disertacio. Dume eksplodis la unua mondmilito kaj dum tiu ĉi tempo li servis kiel milita rentgenologo en Praha. Nelonge antaŭ la fino de la mondmilito li doktoriĝis ĉe la praga universitato per la dizertacio "Pri la elektro-afineco de aluminio", en kiu li la unuan fojon renkontis problemon, kies solvo en pli postaj jaroj kondiĉis lian fame-konatan polarografion. Siajn studojn ĉe la



londona universitato li fermis en la jaro 1921 per doktoriĝo.

De post tiu ĉi tempo li plene dediĉas sin al la studo de elektroĥemiaj fenomenoj sur la gutanta merkura elektrodo. La fundamentan signifon havis la pravo uzi la gut-elektrodon en la elektroliza aranĝo kaj bildigi la kurbliniojn de intenzito de kontinua kurento depende de la surmetita potencialo. Jen la komenco de eksterordinara malkovro, kiu enportis lumon en la esploron de la elektrodaj precezoj kaj kiu ebligis samtempe akiri informojn pri la konsisto de la elektrolizata solvaĵo. Kun sia japana kunlaborinto Masuzo Shikata el Kyoto li konstruis aparaton (polarografon), kiu aŭtomate registris sur la fotopaperon la studatajn kurbliniojn kaj mallongigis esence la tempon por la analizo bezonatan. La nova polarografia metodo donis eblon ne nur determini kiuj elementoj troviĝas en la studata solvaĵo (laŭ la granda de "duononda potencialo"), sed el la alteco de la "polarografia ondo" oni facile povas legi ankaŭ la precizan kvanton de la ĉeestanta ĥemia elemento (vidu bildon malsupre). La metodo estas tra sentiva kaj preciza, sekve ĝi trovis tre oftan

aplikeblon en la praktiko. Al Praha venis multaj sciencistoj el diversaj landoj por studi la novan metodon kaj enkonduki ĝin en siajn laboratoriojn. En la monda ĥemia gazetaro aperis ĉiam pli ofte artikoloj dediĉitaj kaj al la teoriaj kaj al la praktikaj problemoj de tiu ĉi metodo.

Intertempe J. Heyrovský fariĝis profesoro ĉe la praga universitato (1926). Kun sia amiko profesoro Votoček li fondis nian plej reprezentan ĥemian gazeton Collection of Czechoslovak Chemical Communications, kiu konatigas la fremdlandon kun novaj laboroj de la ĉeĥaj ĥemiistoj. Dank' al tiu ĉi gazeto kaj dank'al siaj vojaĝoj eksterlanden la polarografio penetris en la tutan mondon. Kompare kun la eksterlandaj ĥemiistoj, kiuj koncentras sian atenton je la praktika apliko de la metodo, la praga skolo, kiu kreiĝi ĉirkaŭ Heyrovský, disvolvis teoriajn principojn de la polarografio.

Eĉ dum la dua mondmilito Prof. Hyyrovský ne ĉesigis siajn esplorajn laborojn. Li metis fundamentojn por t. n. oscilopolarografio, kiu plua vastigis eblojn de esploristoj. Post la milito venis novaj labor-avidaj disĉiploj al la universitato kaj la tradicio de la polarografia skolo do ne estis rompita.


La ĉeĥoslovaka registaro fondis en la jaro 1950 Polarografian instituton, kiun transprenis en 1952 Ĉeĥoslovaka akademio de sciencoj. Prof. Heyrovský estis nomita direktoro de tiu ĉi mondkonata centro de la polarografia esploro.

La eminentaj rezultoj de la esplor-laboro de Prof. Heyrovský estis aprezitaj per multaj ordenoj, premioj kaj titoloj: Ŝtata premio de I-a grado (1951), membreco en la Akademio de sciencoj (1952), Ordeno de Respubliko (1955), 4 eksterlandaj akademioj de sciencoj honorigis lin per membreco kaj ĉe multaj univeraitatoj li akiris honoran doktoran titolon.

Malgraŭ ĉiuj ĉi eminentigoj restas akademiano J. Heyrovský modesta homo kaj amika instruisto por siaj lernantoj. Li estas modelo de la nova sciencisto, kiu proporcie harmoniigas laboron sur kampo de la scienco kaj rilatojn inter la kunlaborantoj. Tial li estas tiom ŝatata de ili. Tial oni tiel ĝoje akceptis la sciigon pri la honorigo de akademiano J. Heyrovský per la plej alta premio, kiun povas sciencisto, akiri. Per la ricevita Nobel-premio li samtempe konfirmis la altan nivelon de la ĉeĥoslovaka ĥemia scienco.

Ni aliĝas al ĉiuj gratulintoj kaj deziras al akademiano Jaroslav Heyrovský firman sanon kaj pliajn sukcesojn sur kampo de la scienca esploro.

Vlastimil Novobilský,
prom. chem.



**DOLAROGRAFIA
SPEKTRO**

Vikingoj ANTAŬTEPE KAJ NUN

Antaŭ mil jaroj okazis en Danlando, ke kelkaj regionoj fariĝis tro dense loĝataj kaj multe da junuloj devis elmigri. Sed tiutempe oni ja ne povis aĉeti bileton por oceana ŝipo kaj vojaĝi al fremda kontinento kaj tie komenci novan ekzistadon.

Ne-ne, tiu elmigrado okazis alimaniere. La junuloj ekipis grandan velŝipon kaj kunportis sufiĉan kvanton da armiloj, kiel ekzemple glavojn, klabojn, lancojn ktp. Do vi certe komprenas, ke ilia vizito ĉe fremdaj bordoj ne okazis en pacema maniero.

Nuntempe oni nomus tiajn elmigrintojn "mar-rabistoj", sed ili mem ne konsideris sin tiaj. Ili estis liberaj homoj kun amo al aventuroj. Ĉar ili kutime havis siajn hejmojn apud golfetoj, ili nomis sin VIKINGOJ. La dana vorto VIG kaj la samsignifa norvega kaj sveda vorto VIK havas la sencon GOLFETO. Tial la vorto VIKINGO fakte signifas "loĝanto ĉe golfeto".

Per siaj tiel nomitaj "Viking-boatoj" ili kuraĝe kontraŭstaris la ŝaŭmantan oceanon kaj atingis malproksimajn landojn.

Ekzemple, kiam ili atingis la nordan parton de nuna Francio, tiam ili tuj spertis, ke tiea loĝantaro ne akceptis ilin amikece, kaj pro tio ili senhezite "igis la glavojn paroli", tio estis ja lingvo, kiun ili bone komprenis. La vikingoj, kiuj grandnombre invadis Francion, fariĝis tiom malbonfamaj, ke patrinoj diradis al siaj infanoj: "Se vi ne estos obeemaj, venos je vi normanoj!" La franca nomo Normandio fakte signifas la regionon, kie loĝas la viroj el Nordo.

Sed malgraŭ iliaj mar-rabistaj agoj tamen vikingoj estis bonaj agrikulturistoj, bonaj fiŝkaptistoj, kaj ne malplej bonaj organizantoj, kiuj iom post iom kreis leĝosistemon por tiel krei pacon kaj ordon en la lando, al kiu ili "elmigris".

Eĉ Grand-Brition ili konkeris kaj tie regis kelktempe. Multe da danaj vortoj eniris la anglan lingvon, interalie krono (crown), ŝilingo (shilling), leĝo (law), plovo (plough).

Ili lernigis al angloj fariĝi bonaj maristoj kaj kreis ankaŭ tie efektivan leĝosistemon.

La islanda vikingo "Lejf la Feliĉa" per sia boato atingis la bordon de Norda Ameriko. Do Columbus fakte tute ne estis la unua trovinto de tiu ĉi kontinento.

Aliaj skandinavaj vikingoj penetris en la tiaman Ruslandon kaj atingis lokon, kiun oni nomis "Miklagard".

Mi devenas el la norda regiono de Jutlando, nomata Vendsyssel. La junuloj ankaŭ tie devis elmigri, sed ne per boatoj, ili iradis tra Eŭropo kaj tie multon detruis. Homoj donis al ili la nomon VANDALOJ (simile al ilia hejma nomo VENDELBORF).

Obstine kaj senstime ili atingis la regionon hispanan, kiu nun nomiĝas Andaluzio. Multe da historiistoj akceptas la hipotezon, ke la lando antaŭtempe ekhavis la nomon VANDALUSIO. Iu dana scienculo iam vizitis Andalusion kaj tie rimarkis, ke la konstrumaniero tie tute similas al la konstruado de bienoj en Vendsyssel - domoj de speciala aspekto, kiun oni ne vidas aliloke en Hispanio.

Kelkaj el la nuntempaj loĝantoj de Andaluzio estas ruĝharaj, kio ankaŭ ne estas kutima en Hispanio. Eble tiu ĉi ruĝa aŭ blonda hararo estas heredaĵo de la tiutempaj

vandaloj, kiuj estis grandaj fortaj viroj, kiuj ŝatis la hispanajn virinojn (aŭ ĉu estis male?).

En nia moderna tempo danoj ne plu estas militemaj kiel iliaj prapatroj. Nun ili emas batali nur por atingi bonan sidlokon en tramo, trajno aŭ kino-teatro.

Ilia plej akra armilo nun estas la humoro, la rido, tion spertis la hitleranoj, kiam ili okupis Danlandon en 1940-1945.

Taman la dana (aŭ skandinava) varto VIKING ne "eniris en la libron de forgeso".

Granda krajon-fabriko nomigas VIKING kaj ilia fabrik-marko estas vikinga ŝipo.

La kooperativa bierfarejo "La Stelo" fabrikas bongustan eksport-bieron, kiu nomiĝas VIKING - sur ties etikedo ankaŭ troviĝas ilustraĵo de vikinga ŝipo.

Ŝip-kompanio, kies ŝipoj veturas de Danlando al Svedio, portas la nomon VIKING.

La loĝantaro en FREDERIKSSUND (urbo situanta 50 km de Farum) ĉiujare aranĝas viking-teatraĵon. Viroj en tiu ĉi urbo lasas al si kreski barbon kiel vikingoj. Ili eĉ vizitis Grand-Brition kaj Francion, - kaj nun la fremdlandanoj akceptis ilin amike.

"La Skandinava aerolinia sistemo" S.A.S. posedis plurajn ĵet-flugmaŝinojn, kiuj havas la kromnomon VIKING.

Eble vi ankoraŭ memoras, leginte en gazetoj, ke antaŭ tempo okazis terura katastrofo en Turkio, kie ORM VIKING kun 42 pasaĝeroj tute detruigis pro eksplodo.

Ekzistas multaj homoj, eĉ maljunaj, kiuj kun entuziasmo sin banas la tutan jaron, spite al frostoj, neĝo kaj glacio. Ili hakas truegon en glacia tavolo kaj sentime naĝas tra malvarma akvo. Tiaj kuraĝaj homoj, kiuj diras, ke la vintra banado estas la plej saniga, estas nomataj VIKINGOJ.

Bebel Sorensen (Farum).

Josef Václav Sládek :

La CINDRA MEKREDO

Post karnavala marda fest'

Merkredo Cindra mismienas:

de pli ol unu belulin'

la pastra moŝt' konfeson prenas.

Se faros do konfeson vi,
knabin' el ĉiuj plej gracia,
ne diru, ke vi amas min -
ĝi estas peko ja nenia.

Kaj se li tamen urĝos vin,
nur unufoje ĝin flustretu,
sed poste tion al mi mem
milfoje, karulin', ripetu!

El la ĉeĥa Miloš Lukáš.

NIA SPEGULO

NOVA VORTARO DE RUDOLF HROMADA APEROS.

La ŝtata pedagogia eldonejo en Praha akceptis la manuskripton de nova vortaro de Rudolf Hromada kaj eldonos ĝin ankoraŭ nuajare en unu volumo poŝformata kun pli ol 300 paĝoj. Kvankam ĝi estos t.n. malgranda vortaro, la nombro de esprimoj superos pli ol 10.000 (la esp.-ĉeĥa parto ĉ. 5000, la ĉeĥa-esperanta iom pli). Tiu ĉi manvortaro konsiderinde riĉenhava forigos la mankon de vortaroj antaŭ la intencata t.n. mezgranda vortaro kun 50.000 - 60.000 esprimoj, kiu povas aperi post ĉ. du jaroj.

La Esperanto-rondetoj ricevis alvokon de Ĉs. Esp.-Komitato antaŭmendi la vortaron jam en marto 1960 ĉe la Komitato (Praha 12, Blanická 4), por ke la eldonejo povu fiksi la eldonkvanton. La prezo estos ĉirkaŭ 10 Kĉs.

PROF. E. BOKAREV EN PRAHA.

Unu el la plej konataj esperantistoj de Sovetunio, E. Bokarev, vicdirektoro de Lingvosciencia Instituto de Akademio de Sciencoj de USSR, partoprenis en Praha 10.-15.3.1960 internacian konferencon de slavistaj terminologoj. Sabatan kunvenon telefone kunvokitan partoprenis krom 50 praganoj ankaŭ la konata japana esperantisto kaj verkisto Kei Kurisu. Ambaŭ eminentuloj transdonas amikan saluton al la ĉeĥoslovakaj esperantistoj.

HUNGARA KARAVANO EN ĈEĤOSLOVAKIO.

En marto restadis en ĈSR 14-membra karavano de hungaraj fervojistoj esperantistoj el iskolc kaj Budapeŝt. Ĝi vizitis Koŝice, Praha kaj la montaron Tatra.

KUNSIDO DE VORTARA SEKCIO DE Ĉ.E.K.

5.-6.3.1960 kunsidis en Brno, sub prezido de la sekciestro T. Kilian, la vortara sekcio de Ĉs.Esp.-Komitato. El dek membroj de la sekcio ĉeestis 7 (Kilian, Hromada, Kořínek, Mařík, Rosa, St. Seemann, Vondroušek). La kunvenintoj aŭdis i.a. raporton de R. Hromada pri pretigo de la manuskripto de lia vortaro. Poste oni traktis en du kunsidoj pri ellaboro kaj eldono de pli granda vortaro E-ĉeĥa kaj ĉ.-esp.-a, kiu enhavos kelkdek mil ideojn (nociojn). La slovakaj membroj de la sekcio preparos ellaboron de analoga vortaro por slovakoj.

jm.

NI PORTAS PRI NOVAJ GRUPOJ.

Nova E-rondeto fondita ĉe la Kleriga Kunularo en Dražůvky apud Kyjov. Kunvenoj ĉiusabate je 15-18 h. Gvidas Fr. Sovek, anstataŭas St. Penčík. Kurson por komencantoj /16-18 h./ gvidas Fr. Svačina.

Nova interes-rondeto de Esperanto sstis fondita en industria lernejo en Karviná; 20 membroj, prezidas Miroslav Tvardek, insitruas Vl. Slaný.

Junulargrupo 15-membra fondiĝis ĉe loka E-rondeto en Olomouc.

LA AGADO EN TŘINEC DIREKTAS AL LA POPOLO.

E-rondeto ĉe ZK ROH "Třinecké železářny" ne limigas sian agadon nur je E-kurzoj. Ĉi-jare ĝi denove organizos 5 aŭtobusajn ekskursojn ne nur por sia anaro, sed ankaŭ por la ceteraj okupitoj de la uzino. Ekskursoj unu -kaj plitagaj, sub la devizo "Ekkonu vian patrujon" estas ĉiam altnivelaj kaj havas jam certan nombron de konatantaj partoprenantoj.

E-rondeto transprenis antaŭ proksimume unu jaro patronecon al la unua "brigado de socialisma laboro" en la ferfabriko, gvidata de k-do Pyško Johane, kiu laboras en konstru-laborejo de mekanika uzino. La komitato de E-rondeto penas, ke la kunlaboro estu laŭeble plej vaata. Ĉiumonate oni aranĝas por la brigado almenaŭ unu kulturalan prelegon, se necese, ankaŭ kun filmprojekcio. La E-rondeto invitis la membrojn de la brigado al tritaga aŭtobusa ekskurso, kiun la rondeto aranĝis de la 7-a ĝis la 9-a de majo, okaze de la 15-a datreveno de liberigo da nia patrujo per Ruĝa Armeo, por pli bone konatiĝi. Oni vizitos kastelojn, valbaraĵojn kaj aliajn vidindaĵojn de meza kaj suda Moravio. Komitatanoj de E-rondeto faras ĉion por forigi malfacilaĵojn aperantajn de tempo al tempo sur la vojo de modela plenumado de labortaskoj de la menciita brigado de socialisma laboro.

ESPERANTO-FAKO DE ZK VŽKG EN OSTRAVA.

dissendis al siaj membroj program-temaron por la 2-a kvaronjaro 1960. Ni atentigas je la programoj ankaŭ ĉiujn ceterajn e-istojn el Ostrava kaj la ĉirkaŭaĵo:

- | | |
|--|------------------|
| 27.4. "Jozefo ekskursas al Marso" de Z.Čapek | - ERINACO |
| 4.5. 15-a datreveno de la liberigo | - V. Slaný |
| 11.5. Pri novaĵoj en E.literaturo | J. Werner |
| 18.5. Kun gitaro ĉirkaŭ la mondon: Wolkovinský-Petrovský | |
| 25.5. Dek jaroj de NHKG | - Inĝ. J. Pastor |
| 1. 6. Profesoro B. Hrozný-egiptologo | - A. Staňura |
| 8. 6. Vespero de ĝazmuziko el gramodiskoj | |
| 15. 6. SERENADO, koncerto de L. Čermáková kaj V. Sebera | |
| 22.6. Ni ekkonu nian patrujon! | - Vl. Kočvara |
| 29.6. Vespero de bonhumoro | - ERINACO |

PŘÍBOR – URBO DE ESPERANTISTAJ INFANOJ

E-rondeto ĉe 8-jara mezlernejo en Příbor solenis sian 10-jaran jubileon. Estas ĝojige, ke venis preskaŭ 100 gratuloj el la plej diversaj landoj, ankaŭ de multaj lernejoj, precipe el Francio, Hungario kaj Bulgario.

En lernejo ekzistas E-rondeto ankaŭ en Pionira organizo. Krome la instruisto A. Satték instruas eksperimente en la tria klaso, do infanojn 9-jarajn. La instruado estas promesplena, ĉar pri ĝi interesiĝas ankaŭ la gepatroj, kiuj lernas Esperanton kune kun siaj infanoj.

Okaze de la Internacia tago de virinoj la E-rondeto dissendis infanajn bondezirojn: "Estimataj patrinoj! ... Eduku infanojn en amo, feliĉo kaj paco, por ilia feliĉa estonto, por ke ili ne vivu en ombro de milita timo, sed kresku kaj vivu en sunplenaj tagoj, monatoj, jaroj!!! ...

19.2.1960 komenciĝis printempa E-kurso por metiaj lernantoj ĉe la uzino TATRA en Příbor. 15. junulojn instruas A. Satték (Příbor 744).

NI KUNVENIS EN STONAVA.

27.3.1960 okazis en Stonava publika prelego pri Esperanto. Samtempe estis aranĝita la ekspozicio, partoprenis 80 personoj, precipe lernejinferoj. Posttagmeze

okazis e-ista laborkunveno.

KULTURA AKTIVECO DE JUNULARO BRNO.

5.4.1960 la junularo (12-membra kolektivo) aranĝis en E.K.Brno vesperon de prozo, poezio kaj kantoj "Amo, juna amo".

Preskaŭ ĉiuj gejunuloj estas ankaŭ membroj de la teatra grupo, kiun gvidas M. Adamcová. La IV-a teatra vespero okazis la 26.4.1960.

ESPERANTO-EKSPOZICIO EN BRNO.

En agrikultura altlernejo en Brno estis aranĝita la E-eksponzio sub patroneco de fakultata ĈSM kaj ROH (agronomia fakultato, fito-fako). En la ekspozicia libro jam la unuaj vizitantoj vortigis sian admiron pri la aranĝo kaj deziron pri organizo de studenta Esp.-rondeto, kiu ebligus al gestudentoj konatiĝi kun fundamentoj de la internacia lingvo. La ekspozicion iniciatis s. Rostislav Richter, studento de la fakultato.

HELPIS ESPERANTO KAJ ESPERANTISTOJ.

Nia malnova samideano Janita Ŝtefano en Nové Zámky grave malsaniĝis. Sukcese aplikebla estis nur svisa medikamento, ni do skribis al niaj nekonataj samideanoj en Svislando. Rezulto. Dum unu semajno ni ricevis aerpoŝte 250 tabledojn (kiel donacon) de niaj svisaj s-anoj. Nia malsanulo jam malrapide resaniĝas - Dankon por la grandanima kaj rapida helpo!
Ernesto Galeta

KONTRAŬ ATOMBOMBAJ EKSPLODOJ!

Esperantistoj en Poděbrady, kunvenintaj 18.2.1960, sendis protestajn leterojn kontraŭ franca atombomba eksperimento en Afriko. "...En nuna tempo, kiam prudentaj homoj pensas pri likvido de atombomboj, estas la ago de franca registaro malamika al la tuta homaro, eĉ al la tuta franca popolo mem..."

TAGOJ DE LA AMIKECO DE LA E-RONDOJ EN ÚSTÍ n/Labem KAJ LÁZNĚ TEPLICE okazis en solena maniero dum pasko. Jen konciza programo:

Ústí nad Labem - 17.4.1960

9-a h.: Publika prelego de japana samideano Kei Kurisu: Japanio hieraŭ kaj hodiaŭ.

Posttagmeze aŭtobusa ekskurso al la kastelo Střekov k. a. historiaj lokoj kaj fine veturo al Teplice, kie daŭriĝis la programo.

19.50 h.: Komuna solena kunveno de ambaŭ rondetoj. Partoprenis pluraj gastoj el div. lokoj (ĉ.50). La kunvenos daŭrigis estrada programo, kiun prezentis junaj ges-anoj el Teplice kaj Ústí kaj membroj de ERINACO el Ostrava.

Lázně Teplice - 18.4.1960.

7-membra satira kolektivo ERINACO el Ostrava (VŽKG) prezentis premiere novan teatraĵon (unuhoran unuaktaĵon en 4 bildoj (de Zdeněk Čapek "Jozefo ekskursas al Marso". Krome L. Piotrovský el la sama grupo ludis je havaj-gitaro.

NOVA VERKETO DE ZDENĚK ČAPEK

La nnomo de Zdeněk Čapek estas konta al ĉiu leganto de Fajrero. Li persone estas unu el ni, junulo, kiu partoprenas la movadon junularan en la lasta jardeko, modesta, profesie promovita ekonomo, pragano kaj amiko kaj kunlaboranto de Fajrero kaj Erinaco en Ostrava. Aŭtune 1959 li famiĝis per teatraĵo (kun R.Kudla)

"Esperantisto, lia ekesto kaj malapero". Poste li verkis kaj dediĉis al Erinaco novan mezlongan teatraĵon "Jozefo ekskursas al Marso", kies premieron en Teplice Lázně (18.4.) li ankaŭ partoprenis.

"Jozefo ekskursas al Marso" estas denove satiro, kvankam ne tiom burleska, satiro nepre ne formalisma. Ĝi estas tre aktuala, ĉar batalas kontraŭ militarismo kaj malplena, danda vivo de junularo. En ĝiaj kvar bildoj (Tri muskedistoj, Lasta kolonelo, Marsa virino kaj tera frukto, Jozefo vekigas) fine falas lastaj militistoj kaj Jozefo, reprezentanto de juna generacio, ekkonas veran valoron de integra vivo. Kvankam la finalo impresas iom torse, ĝi estas motivita klare. Espereble baldaŭ vi povos aŭdi la teatraĵon el sonbendo preparata de Ostrava Erinaco. J.W.

SOLENA KUNVENO KAJ KULTURA PROGRAMO DE (19.6.-9-a horo)

esp-istoj en Třinec okazos nunjare la 18.-19. de junio en kafejo Klub. Ekskurso al Javorový dimanĉe posttagmeze. Kiu interesiĝas pri partopreno kaj deziras prizorgi tranokton, skribu al: Pavel Kohutek, Třinec I, Těšínská 378.

ESPERANTO EN LA GAZETARO.

"ZBROJOVÁK" n-ro 19 (Vsetín 30.9.1959) "Činnost kroužku esperantistů při ZKD" -st-

"ZBROJOVÁK" n-ro 5 (Vsetín 15.2.1960) – inf. pri kunvenoj de E-rondeto.

"FILATELIE" n-ro 4 (Praha 22.2.1960) – recenzo pri nova bulgara pm eldonita okaze de la Zamenhofa jubileo (pĝ. 77) kaj ties reproduktaĵo (pĝ. 62).

"Kultúrny život" n-ro 8 (Bratislava 20.2.1960)-art. de I.H. "Pomoc esperanta" pri ĉeĥa k.a. literaturoj trad. en la ĉinan lingvon pere de Esperanto.

"SLOVENSKÝ STENOGRAF" n-ro 4 (dec 1959) publikigas art. pri rusa stenografio kun mencio pri E-adapto de sistemo de Aleksandrova O., "Fonostenografio".

"LAŠSKOSLOVÁCKÝ TEXTILÁK" n-ro (Frýdek-Místek 11.2.1960) – kolono titolita "Pozdravy ze zahraničí" (de e-istoj).

"ŽELEZNIČÁŘ" n-ro 2 (Praha, feb. 1960) – tutpaĝa artikolo "Odpoledne u Růžičků" prezentas belan portreton de fervojisto, samideano Václav Růžička el Děčín.

"ATENTU LA SCIIGON EL WROCLAW!

25.-26.6.1960 Sur Sněžka en Krkonoše okazos kunveno de Pola Esperanto Junularo el Wroclaw. Adreso: Pola Esperanto Junularo, Wroclaw, ul. Dubois 3, Pollando.

LA MOVADO eksterlande

UNESCO OFICIALIGIS LA CENTJARAN DATREVENON DE LA NASKIĜO DE ZAMENHOF dum la 55-a de la Plenuma Komitato. Ĉiuj registaroj kaj neregistaraj organizaĵoj estis invitataj per letero CL/1406 de la 15-a de februaro 1960, partopreni oficiala en en la memorigo dum la j. 1960.

TERITORIA ESPERANTO-RENKONTIĜO EN BUDAPEST.

Okaze de la granda nacia festo hungara, 15-jara datreveno de liberigo de Hungarlando, la Budapesta Komitato de Hungarlanda Esperanto-Konsilantaro aranĝis la 2-an kaj la 3-an de aprilo sukcesan renkontiĝon en la Poŝtista Kulturdomo. Partoprenis aktivuloj ankaŭ el Pollando, Bulgario, Aŭstrio, Rumanio. La hungarlandaj gastoj, krom trarigardo de la ĉefurbo kaj vizito de provincaj lokoj, faris kelkajn gravajn priparolojn ĉe la HEK, akceptis ilin ankaŭ kelkaj gravaj personoj, inter ili la ministro István Kossa, k-dino I.Vass, vicprez. de la parlamento kaj la Hungarlanda Packonsilantaro. La lastan partoprenis ankaŭ s-ano I. A. Perez el Meksikio.

IMITINDA EKSPERIMENTO.

Kelkloke oni instruas geografion helpe de Esperanto, sed unuafoje okazis, ke tion faris alilanda instruistino. A-ino Roma Thorsen, mezlerneja profesorino el Kopenhago, donis la kutiman geografian lecionon en hungara knabingimnazio en Budapest pri Danio en Esperanto. P.B.

ESPERANTO REKONATA STUDLINGVO EN HUNGARA UNIVERSITATO.

Ĉe la ŝtat- kaj jurscienca fakoj de la universitato en Budapest estas du lingvoj devigaj. Unu el ili estas la rusa lingvo. Nun dekanon de la fakultato donis al unu studento permeson skriban, ke li rajtas studi, kiel la duan lingvon, Esperanto.

APROBA DOKUMENTO PRI HUNGARA-SOVETA AMIKECO.

La Landa Estraro de la Hungara-Soveta Amikeco-Societo en Budapest donis al la Esperanto-fakrondo "Konkordo" honordiplomon pro eiminenta strebado pri la hungara-soveta amikeco per Esperanto.

ESPERANTISTINO SUR HUNGARA POŝTMARKO.

La hungara poŝto eldonas poŝtmarkojn kun virinaj portretoj. Unu el ili estas de Kato Hámám, kiu estis vigla esperantistino en Budapesta Laborista E-movado. Ŝi estis laborist-movada heroino, kies statuo staras ĉe la Okcidenta stacidomo en Budapest kaj laŭ ŝi oni nomis stratojn, lernejojn, pionirhejmojn k.s.

RADIO FENJAN DISAŬDIGAS INRORMOJN EN ESPERANTO

ĉiumerkrede de la 12-a ĝis la 12.50 h. laŭ MET per ondoj 820, 1080 kaj 6250 kc. Korea tempo 20-20.30 h. Skribu al Korea Esperanto-Asocio, Fenjam, P.O. Kasto 16, Koreo.

EN BULGARIO ESTAS 10 STRATOJ DE ESPERANTO aŭ de Zamenhof, pluaj 5 - 6 nomigoj estas atendataj.

SET

Brno (10.4.1960). La preparkomitato de SET-60 la trian fojon kunsidis por solvi la nunjaran, jam la 8-an Someran Esperanto-Tendaron en ĈSR. En intima saloneto de hotelo Slovan parolis gejunuloj, traktis serioze, konsciaj pri plena respondeco. Unu post alia iris temoj, estis diskutataj kaj notataj la plenumotaj taskoj. La ekipo, kursa enhavo, instruistoj, distraj programoj, gvidantoj k.a.. - Kio nova estas preparata? Internacia karnavalo, filmado, diversaj interes-rondetoj, kurso de naĝado. La kabano Esperanto estos pligrandigita. Grandaj armeaj tendoj por lecionoj... La aliĝiloj estas jam pretaj kaj la sekretariino Magda Matušková (Opava, tĥ.Spojenců)

jam atendas vian aliĝon. Ne prokrastu ĝin, ĉar nunjaro povas akcepti nur 100 gejunulojn. La Arĝenta golfo de barlago Vranov nad Dýjí kaj nia Esperanta herbejo estas ŝatinda angulo de sudmoravia regiono. Baldaŭ tie elkreskos blankmakula ringo el tolaj dometoj – nia SET. Pripensu la ĉeeston kaj aliĝu baldaŭ! Se vi bezonas oficialan inviton por akiri libertempon en la koncerna dato, postulu ĝin de: Esperanto rondeto ĉe "Dům osvěty", Třebíč.

EMK ESPERANTA MAGNETOFONA KUNLABORO

Kio ĝi estas? Ne estas ankoraŭ, sed povas esti. Kaj estus tre utile, se ĝi efektiviĝus. Ne estas bezone akcenti, ke kultura kunlaboro inter la rondetoj estas utila. Niaj kunvenoj estas ofte unutemaj kaj eĉ enuigaj kaj vi mem scias, kiel humoro altiĝas salte, se alvenas anoj de alia rondeto kaj prezentas ion el sia laboro. Sed tiujn vizitojn povas fari nur proksimaj rondetoj. Kaj ni volas ankaŭ ĝui ekzemple Ostravajn kabaretojn, Brnajn poezi-programojn, Pragajn prelegojn.

Kaj jen proponas sin bona helpo. Multaj rondetoj certe havas eblon elprunti magnetofonon. Kaj pere de ĝi ni povus okazigi bonan kaj utilan kulturan kunlaboron. Niaj rondetoj povus surbendigi siajn plej interesajn programojn kaj la bendon lasi cirkuli en la rondetoj aliĝintaj al kunlaboro. Temas precipe pri programoj muzikaj, kantaj, kabaretoj, estradoj, teatraĵoj (kompreneble akomoditaj por aŭskultado), literaturaj programoj, interesaj prelegoj k.s. Ni vokas la rondetojn en Brno, Ostrava, Praha, sed ankaŭ ĉiujn aliajn, eĉ la plej malgrandajn, ĉar sufiĉas du, tri lertaj homoj por fari belan programon.

Kia utilo el tio? Precipe vi buntigos viajn kunvenojn per nova varia enhavo kaj due certe altiĝos la intereso pri laboro en preparado de programoj kaj ankaŭ dum la preparo kreskos lingva nivelo.

Kaj nun al la organiza flanko. Ĉiuj rondetoj, kiuj havas eblon havigi al si magnetofonon, aliĝu al ni (Esperantský kroužek při OB, Králíky, okres Žamberk). Sciigu al ni samtempe nomon de unu el viaj anoj, kiu zorgus pri la kunlaboro, ekspedus la bendojn (t.n. zorganto pri EMK). El la aliĝintaj rondetoj ni faros cirkulan rondon, kiun ni publikigus en "Fajrero". Se iu el la rondetoj surbendigus iun programon, ĝi sciigus al ni (por evidenco) pri kio temas kaj sendus la bendon al la plej proksima rondeto laŭ la fiksita cirkulvojo. Tiu post semajno sendus ĝin al la plua ktp. ĝis la bendo revenus al la aŭtoroj. Kune kun la bendo la aŭtoro rondeto sendu paperfolion, sur kiu estu notita titolo de la programo, speco de programo (ĉu muzika, literatura k.s.), aŭtoroj, ludantoj, daŭro en minutoj kaj nomo de EMK-zorganto. Sur tiun paperon la rondetoj skribu sian proiujĝon de la programo, laŭdon, kritikon, instigojn.

Tio estas nia organiza propono. Plibonigojn proponu al ni. Sed precipe tuj aliĝu kaj komencu jam nun ekzerci por surbendigo, por ke ni jam baldaŭ povu aŭdi ion de vi (jam promesis aliĝon Ostrava, Pardubice, Králíky). Ni esperas, ke EMK, se ĝi vere efektiviĝos, alportos al ni multe da ĝojoj kaj utilo.

J. Cink

LEKANTETO

PORINFANA PAĜO DE FAJRERO

El la kajero de Onklo Paŭlo"

RAKONTO PRI NIA HUNDO

Nia hundo estas Princo
la plej bona en provinco.

Bone gardas nian domon,
ne enlasas fremdan homon.

Al vagulo vigle bojas,
nokte kaŝe ne forvojas.

Se ni krias al ĝi: "Kato!",
tuj saltkuras al la strato.

Kiam iun manĝi vidas,
apud ties seĝo sidas,

ekstarante dupiede
petas pecon fide plede!

Se ricevas grandan oston,
forte svingas sian voston.

Kaŭĉuk-ringon forĵetante
ĝin reportas elegante.

Kiam voĉas "Haltu"-sono,
ĝi obeas al ordono,

se la mastro krias: "Iru!",
tuj ekkuras - vi ne miru.

Jen fidela saĝa hundo,
ni ĝin amas el kor-fundo!
Ĉiam servas nin sen grinco
nia brava hundo Princo.

KONKURSO DE FAJRERO 1960

Eldono de la 1-a ĉi-jara numero de Fajrero malfruiĝis, kaj sekve ĝis la fermo de la 2-a numero venis nur malmultaj solvitaj taskoj. La pritakso de la unua serio estos do publikigita en la 3-a n-ro.

Jen solvoj:

II/3: Shakespeare – Zamenhof; Prus – Kabe; Miczkiewicz – Grabowski; K.Kalocsay; Baudelaire – Kalocsay, Waringhien.

I/1: Iam vivis viro, kiu loĝis en domo, en kiu troviĝis koboldo. La koboldo estis malica kaj ĉiamaniere turmentis la mizeran viron. Fine la viro decidiĝis, ke li tranloĝiĝos; poste la koboldo restu en la malnova domo! Ĉio jam estis transloĝigita, restis nur lasta ŝarĝveturilo kun granda barelo supre. Subite la viro ekvidis sur la barelo ruĝan ĉapon. En la sama momento aperis la koboldo kaj malice diris: "Ho, jen! Ni do hodiaŭ transloĝiĝas!"

LA DUA SERIO

I-a kategorio:

2a/ Přeložte z esperanta do češtiny:

La laborgrupo ankoraŭ ne funkciis. Starante antaŭ la kancelario de la fabriko, mi vane provis bruligi la cigaredon. La vento, kiu balancis la poplojn, kelkfoje estingis mian benzinan bruligilon. Iu laboristo rigardis min ridetante, venis al mi kaj proponis skatolon da alumutoj "Burja" (tempesto). Sur ĝi oni legis la surskribon "ventorezista". Li elskatoligis alumeton, frotis, per ĝi, kaj mi trankvile bruligis cigaredon, kvazaŭ la vento estus ĉesinta blovi.

(el "Nuntempa Bulgario")

2b/ Přeložte z češtiny do esperanta následující věty: Vzpomínáme patnáctého výročí osvobození naší vlasti sovětskou armádou hodnotnými pracovními závazky. - Kdybych nebyl kouřil, nebyl bych nemocen. - Čím mám přispět k našemu vítězství? - Kdyby náš dědeček viděl létající rakety, byl by nepochybně velmi udiven. - 12.V.1960 (vypište slovy různými způsoby).

2c/ Vypravujte v esperantu o své první jarní procházce.

II-a kategorio:

2a/ Antaŭ 15 jaroj finiĝis la plej kruela milito de la homa historio. Milionoj da homoj mortis sur la batalkampoj, milionoj suferis en teruraj koncentrejoj, milionoj malsatis en siaj hejmoj.

Priskribu vian travivaĵon el tiu ĉi trista tempo aŭ rememoru la glorajn tagojn en majo 1945!

2b/ S-ano V. Gruško el Rostov-Don, USSR, tuŝas en sia letero problemon de la plua lingvo-eduko de esperantistaj komencantoj: "...la lernantoj bone sukcesas dum la elementa lernado kaj post la sukcesaj ekzamenoj ni... perdas la lernintojn! Ni semas kaj semas, sed la rezultoj estas ĉiam perdataj Nur po kelke da lernintoj daŭras resti aktivaj esperantistoj". Provu klarigi tiun ĉi bedaŭrindan fakton kaj rekomendi manierojn por la plibonigo.

2c/ Rerspondu jenajn demandojn el la E. historio:

1. En kiu lingvo aperis la unua lernolibro de Esperanto?

2. Kiel nomiĝis la edzino de Zamenhof?
3. Kiujn aliajn projektojn de la internacia lingvo vi konas?
4. Kian signifon havis por Esperanto la rezolucio de UNESCO el la 1954-a jaro?

La solvitajn taskojn sendu al: Vlastimil Novobilský, prom. chem. Slavíkova 346, Ústí nad Labem, ČSR.

B-Kurso

RIMARKOJ POR KURSGVIDANTOJ.

Parolu al viaj kursanoj dulingve. Ĉion diru Esperante, kaj se ili ne komprenas, traduku ĝin en la nacian lingvon. Ĉiun frazon en la ekzerco kursano ripetu kelkfoje flue kaj ne kontentiĝu kun nura traduko ofte tre pene "elŝvitita". Tia flua ripetado de unu frazo memore tenigos skeletojn di diversaj frazoj kaj fleksigos la langon. Ĉiu skriba esprimiĝo de via kursano, precipe hejmaj taskoj, devas esti korektitaj.

Josef Cink.

EKZERCO 15a: Přeložte do češtiny.

La kurso komenciĝos je la oka vespere. Kiu komencos kanti? Kiam finiĝis la koncerto? Ni finos mian laboron post unu horo. Sen mi ne komencu! La vespermanĝo povas komenciĝi.

EKZ.16a: Rozhodněte, jak v následujících větách, přeložíte slova "začítí" a "skončítí" : "komenci-komenciĝi" kaj "fini-finiĝi"!

Začni zpívat! Představení ještě nezačalo? Začneme raději dříve. Kdy skončíme? Přednáška skončila pozdě večer. Hned skončíme. Kurs začne v září a skončí v dubnu. V kolik hodin začíná zkouška? Skončili jsme zkoušku velmi brzy. Schůzka začne už v sedm hodin.

EKZ. 17a: Víte-li, že "en" s l. pádem značí "v, ve" a se 4. pádem "do", přeložte do esperanta:

Do skříně, ve skříní. Jdu do školy. Jsem ve škole. Ráno půjdu do města. Budeš v kině? Půjdeme do lesa. V lese je hezky. Jdu do divadla? Půjdeme do čekárny. Pojď do světnice. Musím dát dopis do schránky. Mám to v aktovce. Dej to do aktovky! V okně, do okna.

EKZ. 19a: Napište 3 esperantské věty na každé z těchto slov: fini, finiĝi, komenci, komenciĝi.

EKZ. 19a: Přeložte plyně ještě jednou věty z cv. 17 a pak překlad napište!

EKZ. 20a: Vypište si a naučte se neznámá slovíčka z následujících: panjo, paĉjo, avo, avino, gefratoj, gepatroj, infano, onklo, kuzo, parencoj, nomigi, antaŭnomo (Baptonomo), familia nomo, naskiĝi, hejmo, hejme, hejmen, edzo, edziĝi, edziniĝi, aĝo, -jara, juna, profesio, okupita, labori, loĝi, loko.

EKZ. 21a: Odpovídejte na otázky a tvořte podobně další! Kiel nomiĝas via patro? Via patrino? Kiel nomas infanoj siajn gepatrojn? Kiu estas patro de via patrino? Kiu estas edzino de via avo? Ĉu vi havas fraton? Kiom da gefratoj vi havas? Ĉu via fratino estas pli aĝa? Kiom da gefiloj havas via onklo? Kie loĝas via onklino? Ĉu vi havas kuzon? Kiel nomiĝas via kuzino? Kiam venas al vi multaj viaj parencoj?

Kia estas via antaŭnomo? Kiu estas via antaŭnomo? Via familia nomo? Kiam vi naskiĝis? En kiu jaro? Monato? Tago? Kie estas via hejmo? Kiam vi venas hejmen? Ĉu vi havas edzon? (edzinon!) Kiu havas lin (sin)? Kiom aĝa vi estas? Kia estas aĝo de via patro? Ĉu vi estas pli aĝa ol via frato? Ĉu vi estas dek-jara? Kvindekjara? Kiu estas juna? Ĉu avo? Kia estas la avo? Kia estas via profesio? Kie vi estas okupita? Kie vi loĝas? Ĉu vi loĝas en via labora loko?

EKZ. 22a: Přečtěte plynne a nahlas následující povídku z "Kabe-legolibro"; Hispanio foje iris tra la ĉeĥa regiono. Estis vintro. Multaj hundoj kuris post li kaj bojis. Li volis levi ŝtonon kaj forpeli la hundojn. Sed la ŝtonoj alfrostiĝis firme al la tero. La hispano kolere ekkriis: "Kia stranga lando! Ĉi tie oni alligas ŝtonojn kaj hundojn lasas liberaj!"

EKZ.23a: Přeložte povídku ze cv. 22 a vypište si všechna neznámá slovíčka. Pak znovu překládejte tak dlouho až budete překládat plynne a bez rozmyšlení!

EKZ.25a: Přeložte a napište (domácí cv.).

EKZ. 24a: Vypravujte povídku ze cv. 22!

Co se u vás děje? Budu na tebe čekat u kina. Potřebuji spravit hodinky. Mám už hodně málo peněz. Kdy dostaneme peníze? Vidíš ty velké domy na náměstí?. Zameť schody! Viděl jsi už ty fotografie z výletu? Půjčíš mi na zítra lyže? Koupila sis nové boty?

EKZ. 26a: Napište stručně v esperantu, jak se vaří káva a čaj: (domácí cv.)

EKZ. 27a: Napište krátký rozhovor dvou nebo více osob, které se baví o sportu! (asi 10 vět, domácí cv.)

EKZ. 28a: Vyzkoušejte si svoji paměť! Zahrejte si následující hru!

Každý účastník pořadě opakuje fráze: "Mia onklo alveturis el Ameriko kaj alportis" a řekne nějaký předmět (samozřejmě ve 4. pádě.). Následující opakuje frázi, všechny už řečené předměty a přidá další. Tak se předměty hromadí. Kdo si nezapamatuje pořadí předmětů nebo nějaký zapomene, vypadá ze hry. Daŭrigota.

LINGVA ANGULETO

S-ano A.Frantl el Opava skribis al ni:

"En nia konversacia kurso estis pritraktita la sufikso -aĝo. Estis donita tasko esperantigi jenan ĉeĥan frazon: "Vepřové maso není zdravé." La kursanoj tradukis ĝin jene: "La porkaĝo ne estas sana." Mi opinias tiun tradukon nesufiĉa. Ĉeĥo vere komprenas, ke temas pri porkaĝo, kiu malutilas al homo. Sed fremdulo povas kompreni, ke la porkaĝo estas difektita, pro tio al homo malutila. Se ĝi ne estus difektita, ĝi estus por homo tute bona. Mi opinias, ke estus pli konvene uzi tradukon: "La porkaĝo ne estas saneca" - Kion vi opinias?

Resp.: Mi opinias nekonvena kaj "sana" kaj "saneca", ĉar ambaŭ "kvalifikas organismon, en kiu ĉiuj organoj normale funkcias" (P.V.) kaj ne povas esprimi la deziratan rilaton inter homa sano kaj porkaĝo. Mi uzus en tiu kazo "sanutila", resp. "san-malutila". La vorto SANECA estas uzebla nur en raraj okazoj, kutime sufiĉas SANA.

EKZ.: Sana homo. Sana evoluo (ne signifas san-evoluo!). Sanaj rilatoj inter

ambaŭ movadoj. - Li havas jam san(ec)an koloron. Li impresas min malsanece. Malsaneca tremo.

J.W.

DIGO – DIGLAGO aŭ BARAĴO – BARAĴLAGO?

Stefan Masarov en "Bulgara Esoerantisto" 1/1960 eksplikas, ke la ĝusta esprimo (fakvorto) estas: BARAĴLAGO, kiu – eĉ povus esti mallongigita je BARLAGO. - DIGO estas laŭlonge de la bordo de rivero aŭ de maro starigita barilo, dum BARAĴO – transverse de la rivero.

KUCENIGMO La maja

Legendo.

Horizontale: A/ eŭropa metropolo (r), adverbo. B/ spaco de kotono (r), artefarita hararo (r), C/ rifuĝejo por ŝipoj, ŝirmilo (r). D/ kare ŝati iun, parto de fervojstacio (renvers., adj.), grasa fluaĵo (r). E/ prepozicio, murteganta materialo, pronomo. F/ franca difina artikolo, pridonato (rv.), interjekcio. G/ mallarĝa terkolo (r). H/ korelativo, afikso, praloĝanto de Japanujo. I/ objekto (afikse) ion entenanta, elektra unuo. J/ kantbirdo. K/ strio (r). L/ ĉina baptonomo.



Vertikale: 1/ ombrostreki (r). 2/ floro (r). 3/ ĉarmegi estigante admiron, ekzisti (r). 4/ grupo, korelativo. 5/ unua parto de la kaŝitaĵo. 6/ kiom ni jam iam vidis (r), kurba linio de planedo (r). 7/ eldonloko de la iama "Tagiĝo", jam neekzistanta asocio. 8/ okulparto (r), pronomo. 9/ J. Baghy, angle maljuna. 10/ dua parto de la kaŝitaĵo. 11/ restadejo (r), hispana rivero. 12/ speco de scienco, konata junular-ano (pseŭd.). 13/ restoracia servisto (r). 14/rumana mono.

La solvo estos publikigita en la venonta numero.

Aŭtoro de a krucenigmo: Vl. Novotný.

Fora amatino

(Mám milou, mám ...)
Ĉeĥa popola kanto.
Tradukis Josef Cink



1. /:La maproksim'
ŝajnas sen fin'
/:kiu malligos min
de amatin' :/
2. /:Se scius mi,
kie la voj':/
/:eĉ tiom foren mi
irus kun ĝoj' :/

NEKROLOGO

S-ano Prof. Josef Kožený el Kutná Hora mortis en Praha la 2-an de marto 1960 en la aĝo de 56 jaroj, post longa kormalsano. La kremacio okazis en Praha 7.3.1960. Lia esperantistan aktivecon kaj noblan karakteron rememoris antaŭ la ĉerko s-ano Jar. Ŝustr.

D-ro Augustin PITLÍK el Praha mortis post mallonga malsano la 4-an de aprilo 1960, en la aĝo de 76 jaroj. Doktoro Pitlík estis meritplena esperantista aktivulo, konata interalie kiel lektoro de Esperanto en la Ĉeĥa teknika altlernejo en Praha (1920-51).

ABONKONKURSO. Pro manko de loko nur koncize: Ni gajnis proksimume 150 novajn abonantojn. La plej sukcesaj kaj promiitaj konkursinto: Zd. Rusím (Teplíce) 23; J. Tichý (Bílá Voda) 12; M. Urban (Děčín) 12; Esp. Servo (Ĉ. Budějovice) 10; Fr. Mančík (H. Němčí) 8; St. Coufal (Jihlava) 8; B. Štefek (Ch. Hradiště) 7; J. Zocher (Žilina) 6; M. Houdková (Ústí n/Lab.) 6; M. Neubaler (Poprad) 6; D. Veselá (Opava) 5; F. Škrla (Kyjov) 7; J. Doležal (Petrovice) 5; E. Turková (Hodslavice) 7; M. Valešová (Liberec) 4; Z. Křimský (Byšice) 4; K. Ryšavý (Brno) 4; Fr. Maděryč (Havířov) 4; E. Geleta (N. Zámky) 3; J. Balicki (Stonava) 3; - Ĉe egala nombro decidis la datoj. (F. Škrla kaj E. Turková estas erare ŝovitaj en la vico iom malantaŭen. Pardonu!) - Al la venkintoj ni gratulas.

ANONCETOJ envicigotaj venonte!

PARDONPETO. En la 5-a n-ro 1959, pĝ. 18, estis erare menciita Tomáš Pumpr kiel tradukinto de la poemo AŬTUNO (J. Seifert). La poemon tradukis Jiří Kořínek.

SE IU ABONANTO en j.1959 niakulpe ne ricevis iun n-ron (krom la 1-a), postulu ĝin ĉe nia administranto! Eld.

HA HA HA HA HA HA HA HAHA HA HA HAHA HA HA HAHA HA HA HA

MARIUS DASTYCH: GEEDZAJ AFEROJ

Estis modela paro:

li – amis stratknabinon,

ŝi – vivis kun najbaro.

EPIGRAMETO

Al iuj eĉ aromo de l' rozoj malplaĉas,
sed ili ne rimarkas, ke mem odoraĉas.

AM-ESENCO

Senlima dank' al dio,

por ĉio kaj por ... nenio.

TRADUKO EL SZTAUDYNGER

Ne donas vin panjo, ne donas fratino,
kion povus doni ĉarma najbarino!

AKTUALA SLOGANO

Faru la korpon forta,

anim' jam estas senmorta!

ALIA SLOGANO

Per perforto – al komforto!

DU FARMISTOJ:

- Mi havas tiom vastan kamparon, ke mi devas du semajnojn ĉirkaŭ ĝin galopi ĉevale.

- Tian ĉevalon ankaŭ mi havas!

DU PULOJ komencis ŝpari. Kaj ili ŝparis kaj ŝparis ĝis ili aĉetis sian propran hundon.

DU RIVALOJ. Hundo kaj viro en strato sin mordas reciproke. Venis policano. La viro sin defendas: "La hundo komencis!"

FAJRERO estas bulteno de junaj esperantistoj en Ostrava-regiono, Ĉeĥoslovakio.
Aperas laŭbezone.

A P R I L O 1960. N-ro 2 (8)

ELDONAS: ZK ROH Třineckých železáren VŘSR, esp. kroužek.

REDAKTAS: Jan Pomykacz, Inĝ. Jan Werner (responda)

RED. ADRESO (valida nur ĝis fino de junio): J. Werner, OSTRAVA 15, Na Lachu 6,
Ĉeĥoslovakio.

ADMINISTREJO: Vl. Kočvara, OSTRAVA VIII, Kamenec 3

ILUSTRIS: Inĝ. O. Stojan

p.k.n-ro T-03 05979